August Heinrich Hoffmann,

## Vespera kanto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ree vesperiĝas
ĉie en la rond',
paco subeniĝas
kaj ripozas mond'.

Riveret' nur fluas
ĉe la roko jen,
kaj ĝi daŭre bruas
plu kaj plu sen ĝen'.

Ne vespero iu
endormigas ĝin,
sonoril' neniu
je la tago-fin'.

Mia koro, tia
estas ankaŭ vi!
Pacon trovos mia
koro nur en Di'.

. . .

August Heinrich Hoffmann,

## Abendlied

Abend wird es wieder,
über Wald und Feld
säuselt Frieden nieder,
und es ruht die Welt.

Nur der Bach ergießet
sich am Felsen dort,
und er braust und fließet
immer, immer fort.

Und kein Abend bringet
Frieden ihm und Ruh',
keine Glocke klinget
ihm ein Rastlied zu.

So in deinem Streben
bist, mein Herz, auch du.
Gott nur kann dir geben
wahre Abendruh!

. . .

August Heinrich Hoffmann,

## Abendlied

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Nun vesper' fariĝas
Ree tie ĉi,
Paco subeniĝas
Kaj ripozas ni.

Rivereto fluas
Ĉe la roko sen
Ĉeso kaj ĝi bruas
Plu kaj plue jen.

Sonoril' neniu
Ripozigas ĝin,
Ne dormigas iu
Ĝin je l' tagofin'.

Tia, mia koro,
Estas ankaŭ vi.
Donu, ho Sinjoro,
Pacon vi al ĝi.

. . .

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de* August Heinrich Hoffmann *(Hoffmann von Fallersleben, ∗1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2013-01-27.*

*Arg-645-1943 (2014-01-28 23:29:57)*

*La melodio estas aŭdebla en* `http://ingeb.org/Lieder/abendwir.html`.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* August Heinrich Hoffmann *(Hoffmann von Fallersleben, ∗1798-04-02 – †1874-01-19).*

*Arg-645-1300 (2012-11-27 18:18:40)*

*Siehe auch:* `http://de.wikipedia.org/wiki/August_Heinrich_Hoffmann_von_Fallersleben`.
*Vidu ankaŭ:* `http://eo.wikipedia.org/wiki/August_Heinrich_Hoffmann_von_Fallersleben` *kaj* `http://www.musicanet.org/robokopp/fallers.html`.
*Siehe auch:*`http://www.swr.de/swr2/program/sendungen/wiegenlieder/rueckschau/-/id=556006/nid=5556006/did=6102144/pv=mplayer/vv=popup/1vijptk/index.html`.

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de* August Heinrich Hoffmann *(Hoffmann von Fallersleben, ∗1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2012-11.*

*Arg-645-1378 (2012-11-27 18:34:25)*

*Vidu ankaŭ:* `http://de.wikisource.org/wiki/Abendlied_(Fallersleben)`.
*La muziknotoj troviĝas en* `http://www.lieder-archiv.de/abend_wird_es_wieder-notenblatt_300026.html`,
*la melodio estas aŭdebla en* `http://ingeb.org/Lieder/abendwir.html`.